2-a Jaro. N-o 44 (96) APERAS SEMAJNE 29. Julio 1926



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY
14, Avenue de Corbéra, Paris-XIIe

Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, Rue Boyer, Paris-XXe

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig O 27

EKRIGARDETO SUR JAPANIAN EKONOMION

Japanio politike estas nobel-burĝa monarkio kaj rapide disvolvas sian ekonomion. Kun siaj kolonioj (Koreo kaj Formozo) Japanio areas ĉirkaŭ 678.000 kv. kilometrojn kaj havas iom pli ol 78 milionojn da loĝantoj.

En la jaro 1919 Japanio havis 24.000 industriajn entreprenojn kun 1.500.000 okupitaj laboristoj. La importo en la jaro 1923 (kotono, maŝinoj, duonkrudaĵo) egalis ĉirkaŭ 300 milionojn da dolaroj usonaj; la eksporto (silko, vitraĵo, sukero, ludiloj) — 700 milionojn.

La japania burĝaro tre profitis el la mondmilito. Sed la detruiĝoj liveritaj de l' fama tertremo ĝis nun estas sentataj. Eĉ la financministro de Japanio Ĥamaguŝi en sia raporto al la parlamento atentigas, ke oni ne devas esti tro optimistaj, ĉar finance kaj ekonomie la lando adas (1) suferi pro sekvoj de l' terura tertremo.

La jena tabeleto ebligas kompari la enspezojn kaj elspezojn de l' japania buĝeto en la nuna kaj pasinta jaroj en milionoj da *ienoj*:

ENSPEZOJ

	de l' nuna jaro	diferenco
	—	—
Ordinaraj	1.365	+ 66
Eksterordinaraj	233	— 18
Sume . . .	1.598	+ 48

(1) La aŭtoro tre logike kaj esperantece verbigis la sufikson « ad ». — *Red.*

ELSPEZOJ

	de l' nuna jaro	diferenco
	—	—
Ordinaraj	1.076	+ 53
Eksterordinaraj	522	— 5
Sume . . .	1.598	+ 48

La diferenco inter la buĝetoj de l' nuna kaj pasinta jaroj, kiel vidigas la tabelo, egalas 48 milionojn da ienoj (*ieno* japania egalas nun 0,47 dolarojn usonajn). Fakte la elspezoj de l' nuna jaro povas altiĝi ne ĝis 48 milionoj, sed ĝis 111 milionoj.

La Registaro intencas pruntepreni nur 150 milionojn.

Oni devas noti, ke la nuna buĝeto en elspezoj altiĝas ĉefe pro jenaj kaŭzoj:

1) Estas pluasignitaj 40 milionoj por salajri la instruistojn de l' popolaj lernejoj;

2) Por efektivigi la leĝon de sanasekuro estas elspezotaj ĉirkaŭ 2 milionoj.

Kelkaj sumoj estas elspezotaj por subteni elmigrintojn (inter ili rusajn blankulojn), malgrandajn terposedantojn, komercŝiparon k. a.

La Registaro intencas ŝanĝi dogantarifojn por pli protekti la enlandan industrion. Krudaĵoj kaj manĝaĵoj supozeble estos tute ne limimpostataj.

MAKSIM KRJUKOV.



LASTHORE

B Moskvo 694/21 13 W 2/W 20 o.

Lunatĉarski akceptis honoran prezidantecon de l' Kongreso.

DEMIDJUK.

El la Redaktejo

Post kelka tempo ni petos la Legantaron, ke ĝi bonvolu vortigi sian opinion pri SENNACIULO. Jam de la n-ro 95 ĉiu bonvolu fari por si rimarkojn, notojn ktp., por povi en oportuna tempo liveri sian *motivitan* opinion. Necesas intima kunlaborado de la tuta Legantaro kun la Redakcio por atingi, ke nia gazeto fariĝu interesa por *ĉiuj* legantoj.

Estas ja neeble, ke ĉiuj artikoloj, ĉiuj rubrikoj plaĉu al la tuta Legantaro; sed ĉiu laborista esperantisto devas trovi en *ĉiu* n-ro de SENNACIULO almenaŭ *unu* artikolon aŭ rubrikon, kiun li legas kun intereso kaj plezuro.

Kompreneble ni ne postulos, ke ĉiu leganto diru sian opinion; sed ĉiu lab. grupo devas nepre entagordigi la demandon pri nia gazeto, pridiskutigi ĝin kaj resumi la debatojn en raporteto, kiun oni havigu al ni. Ĉefe estos atentataj la opinioj vortigitaj je la nomo de kolektivo.

Tuj unu rimarkon : Pro la baldaŭa okazo de nia VI-a, dum ties periodo, la enhavo de SENNACIULO estos ĉefe prikongresa ; ĝia fizonomio kaj enhavo estos do dum kelka tempo ne kutima. Oni bonvolu ne forgesi tion kaj ĝisatendi nian alvokon por respondi al la demandaro.

Sed necesas, ke jam nun ni starigu la ĉefajn punktojn de nia enketo : En la tagordon de la grupoj oni metu jenajn demandojn :

1) Kiun rubrikon el SENNACIULO vi legas kun pli da intereso ?

2) Kiuj artikoloj estis al vi pli facile legeblaj ? — kaj kiuj pli malfacile legeblaj ? — Ĉu la malfacileco kuŝas en la temo mem, aŭ en la stilo de l' verkinto ?

3) Kiujn prilingvajn rimarkojn vi faris ?

4) Kiuj rubrikoj ŝajnas al vi forigindaj ? — kaj kiuj enmetindaj ?

5) Kial ne estas pli da abonantoj en via grupo ?

Memkompreneble ni deziras ricevi jam de la Leningrada Kongreso motivitajn direktivojn por nia redakta laboro.

★

Atendante koni la ĝeneralan opinion de la Legantaro pri nia gazeto, ni hodiaŭ diru, ke rilate la lingvon ni penados, ke ĝi estu kiel eble plej *laŭfundamenta*. Ni trudas al ni la ĉiutagan legadon de kelkaj paĝoj de Zamenhof. Konsilinde ankaŭ estas, ke ĉiuj niaj kunlaborantoj faru la samon.

Aliparte ni sukcesis akiri la kunlaboradon de unu el la plej kleraj kaj kompetentaj esperantistoj, kiu afablos respondi al la eventualaj prilingvaj demandoj de la legantoj. Pro ia kaŭzo tiu altŝatinda kompetentulo deziras konservi anonimecon. Tio ne domaĝas, ĉu ne ? Ne la nomojn de verkintoj atentas la saĝaj legantoj sed iliajn verkojn mem.

Karaj legantoj ! jam vi konas niajn intencojn, pripensu ilin kaj prepariĝu por konigi al ni precize viajn dezirojn, viajn bezonojn. Ni ne dubas, ke per intima interkunlaborado ni finfine sukcesos fari el SENNACIULO, se ne tute perfektan organon almenaŭ la plej perfektan el ĉiuj esperantaj gazetoj.

RED.

Mortminaco al la Laboristaro el la aero

SENLABORAJ REĜOJ RIGARDAS LA MORTIGAJN AEROPLANOJN. — NOVAJ AVIADILOJ TAŬGAJ POR BOMBARDI STRIKANTOJN. — INFANOJ SPECIALE INVITITAJ POR VIDI KIEL ILIAJ PATROJ POVAS ESTI BUĈATAJ.

Antaŭ amaso da laŭmodaj senlaboruloj, inter ili la anglaj gereĝoj kaj aliaj reĝuloj, la Aerarmeo, en Hendon (apud Londono) montris la terurajôjn, kiujn kamparanoj en la kolonioj jam spertis kaj kiujn la laboristaro povas ankaŭ same sperti dum venonta granda striko.



La « Cierva » Aŭtogiro.

Unu el la ĉefaj montraĵoj de la festo estis la « Cierva » aŭtogiro, kapabla flugi tre malalte, kio ebligas al ĝi ŝvebi super ĝia trafotaĵo kaj faligi bombojn tre precize.

Anstataŭ la kutimaj neflekseblaj flugiloj, kvar flugiloj estas aranĝitaj tiele, ke ili rondiras dum flugado kiel horizontala alo de ventmuelilo. Ili simple estas ŝvebiloj, kaj ne estas pelataj de motoro.

Estis montrataj ne malpli ol 16 novaj eksperimentaj tipoj de mortigaj aeroplanoj, kaj la komitato de la aer-parado speciale alvokis la edukajn aŭtoritatojn, ke ili sendu infanojn por vidi la spektaklon. Estas grave memori, ke dum la ĝenerala striko, grandaj taĉmentoj da aeroplanoj estis sendataj al la ĉefaj industriaj centroj, sed malmultaj estis uzataj por la transporto de varoj. Ĉiu komerca aviada kompanio, pro grandaj malprofitoj, ricevas subvencion de la registaro. La forto necesa por porti kelkajn pasaĝerojn aŭ iom da varoj tra la aero estas sufiĉa por funkciigi grandan fabrikejon, ĉu teksa, ĉu maŝina, en kiu laboras kelkaj miloj da laboristoj. La tuta numtempa evoluo de aviadiloj estas do sole detrucela.

Pafado ĉiudirekten.

Same kiel la infana papera ventmuelilo, la ŝvebiloj rondiras nur pro la flugado tra la aero, kvankam oni ekirigas ilin antaŭ ol la aŭtogiro forlasas la teron.

Partoprenis 200 aviadiloj la spektaklon, kiun rigardis 100.000 personojn. Inter tiuj aviadiloj estis pterodaktilo (aeroplano sen vosto). Alia, granda ĝemela bombĵetilo, havis specialan aparaton per kiu la observanto povas pafi en iun ajn direkton.

La estroj de la parado ege fieris, ke la rigardantoj, por kiuj estis aranĝitaj ĉiuj komfortoj, povis ri-

gardi aeromiliton kiel ĝi okazos en la estonto. Ĉi tio montros al la laboristaro, ke krom la uzo de aviadiloj dum strikoj, oni ankaŭ uzos ilin sekve de la freneza febro pro imperia supereco, kio nepre kondukas al milito kontraŭ aliaj landoj simile ekipitaj.

Tradukis el « Sunday Worker » (Dimanĉa Laboristo) :

I. FLOWER.

LA VERO
pri la helpo el Sovetio

La burĝa gazetaro de multaj landoj, precipe el Britio mem, larĝe disvastigas mensogojn pri tio, ke la helpon al strikantaj ministoj el Britio efektivigas *ne la sovetiaj laboristoj mem, sed la sovetia registaro!*

Responde al ĉi malica atako, fakte direktita ankaŭ kontraŭ la britia ministaro, *la sovetlandaj ĉiufakaj laboruloj decidis ne malstreĉi, sed, male, pliviglígi la helpon al la britiaj fratoj.*

Estas ankaŭ absurdaĵo la diro pri tio ke « sovetiaj ministoj ne kapablus je tioma grado helpi el sia salajro la britiajn samfakulojn » : ja al britiaj fratoj helpas ĉiufakaj laboristoj de USSR., eĉ simpatiemaj vilaĝanoj, kooperativoj, gazetoj, ktp.

Ni petas ĉiujn honestemajn presorganojn represi nian komunikon kun la subaj ciferoj. Ili apartenas al la oficiala raporto de Tutsovetia Centra Konsilantaro de Sindikatoj, publikigitaj en ties ĉefa presorgano « Trud » (Laboro). *Ili atestas la veran veron!* Ili atestas tion, ke la tuta sovetia proletamaso partoprenis la helpon al la britia frataro, sed ne ia « bolŝevika registaro ».



El raporto de centra Librotenejo (Kontoro) **de Tutsovetia centra sindikata Konsilantaro** pri la monsumoj, ricevitaj por helpi la strik-ministojn de Britio : dum Majo-Junio 1926.

—

La kaso de TCSK ricevis por peri al britiaj strikantoj :

En rubloj.

1) *El respublikaj, regionaj, guberniaj, urbaj, distriktaj, k. s. sindikat-karteloj :*

Moskvo	407.831.70
Leningrad	417.765.59
Ufa (Baŝkirio)	10.357.16
Novgorod	15.806.75
Ĉeboksari (Ĉuvaŝio)	1.823.31
Kazan (Tatario)	8.983.53
Orel	7.567.10
Arĥangelsk	12.145.27
Tver	26.687.01
Pskov	7.086.74
Briansk	34.967.94
Jaroslavl	44.624.16
Iĵevsk	7.449.22
Riazan	9.871.91
Voronej	33.755.87
Vologda	5.012.05
Kursk	13.467.25
Ust-Sizolsk	2.313.53
Stalingrad	24.004.46
Ulianovsk	8.060.—
Penza	8.336.61
Gomel	9.254.69
Smolensk (Blankrusio)	14.347.43
Saratov	4.870.05
Tambov	18.060.86
Samara	10.820.25
Ivanovo-Voznesensk	39.375.99
Kaluga	7.821.88
Tula	24.957.74
Kostroma	14.396.97
Vladimir	34.595.63
Ĉerepovec	55.000.—
Niĵni-Novgorod	29.787.55
Viatka	15.028.68
Baku (Transkaŭkazio)	63.479.59
Tiflis »	37.490.—
Veliki-Usting	1.919.90
Maĥaĉ-Kala (Dagestano)	727.72
Astraĥan	7.271.81
Pokrovsk (por Volga Germana Respubliko)	5.113.63
Krasnokokŝaĵsk (Mordovio)	765.92
Simferopol (Krimeo)	19.571.46
Kokand (Uzbekio, Mez-Azio)	8.950.—
Piŝpek (Mez-Azio)	1.175.30
Verĥne-Udinsk	2.863.50
Mogilev (Blankrusio)	904.72
Minsk »	31.529.69
Taŝkent (Uzbekio)	14.612.73
Bukhara (Turkmenio)	5.951.89
Poltorack »	1.261.39
Borisov	3.679.25
Vitebsk (Blankrusio)	299.87
Orenburg (Kirgizio)	4.338.05
Ekstrem-Oriento	36.597.55
Kazakio	18.866.18
Nord-Kaŭkazio	163.759.21
Ural-regiono	97.470.75
Siberio	69.480.98
Ukrainio	188.366.67
Jakutsk	1.100.—
De alilokaj sindikatoj	28.320.58
Sume	2.156.602.30

2) *El Centraj Komitatoj de Tutsovetiaj Sindikatoj :*

TCSK	145.000.—
Ter-arbar-laboro	42.931.—
Medic-Sanitario	7.892.01
Akvotransporto	21.100.—
Artistoj	300.—
Ministoj	139.308.31
Lignaĵistoj	2.421.60
Fervojistoj	21.767.72
Komunallaboristoj	8.840.45
Ledistoj	3.257.12
Metalistoj	28.258.74
P.T.T.k.R.	3.038.15
Popol-Nutrado	2.526.07
Presistoj	4.595.44
Nutraĵistoj	24.103.62
Klerigistoj	5.102.08
Paperistoj	15.814.75
Oficistoj	142.803.76
Konstruistoj	3.079.50
Sukeristoj	25.836.05
Loka Transporto	413.04
Teksistoj	19.889.17
Kemiistoj	8.821.29
Kudristoj	2.768.75
Sume	645.764.93

3) *De redakcioj* (monkolektoj inter legantoj) *ktp. :*

« Pravda » (Vero) kaj « Bednota » (Malriĉularo)	66.000.—
« Izvestia CIK »	5.200.91
Ruĝa Dagestan	4.938.71
Ruĝa Tatario	3.000.—
Nia Gazeto	3.400.—
Krasnoe Ĉernomorie (Ruĝa Nigramario)	4.000.—
Bakinski Raboĉij (Baku'a Laboristo)	1.700.—
Diversaj eldonejoj	7.496.14
Sume	95.735.76


4) *Ceteraj :*

« Centrosojuz » (Tutsovetia kooperacia kartelo)	50.000.—
Kultur-karteloj k. c.	99.673.17
Lasthore venintaj el sindikatoj	673.000.—
Entute	3.720.776.16

Tio signifas proksimume 7.440.000 gmk. aŭ ĉirkaŭ 1.913.000 $.

La ciferoj koncernas nur la monsumojn, kolektitajn kaj ricevitajn ĉe TCSK ĝis 1. julio.

PROLET. ESPERANTO-INFORM-SERVO.
(V. K.)



Traduku nacilingven! ĉie represigu!

Politika sukceso laborista en Basel

Dimanĉon la 27-an de junio okazis en Basel popola voĉdonado pri 3 demandoj, kiuj treege interesis la laboristaron : 1) senlaborula asekuro, 2) leĝo pri labortempo, 3) socialista iniciativo por ŝtata loĝejkonstruado.

En Svisio ĝis nun ne jam ekzistas landa leĝo pri senlaborula asekuro. Tio instigis la laboristaron de la duonkantono « Basel-urbo » postuli la enkondukon de tia asekuro sur kantona teritorio. La nova leĝo estas granda progreso en tiu direkto kaj povos servi kiel modelo al aliaj kantonoj. Kompreneble ĝi estis akre kontraŭbatalata de niaj kapitalistoj. La dimanĉa popolvoĉdonado nun akceptis tiun leĝon per 13.468 jes kontraŭ 7.823 ne.

Malgraŭ ke multaj laboristaj postuloj ne estas prikonsiderataj en nia kantona leĝo pri labortempo, ĝi tamen jam delonge estas tro progresema por la basela burĝaro. La burĝa parlamentplimulto post akra batalo nun sukcesis plimalbonigi tiun leĝon tiel ke ĝi tute ne plu estas akceptebla por la laboristaro. La loka sindikata kartelo do decidis preni la

«referendumo-n» (svisa institucio, laŭ kiu parlamentdecidoj devas esti prezentataj al la popolo por decida voĉdonado). La tago de l' laborista festo, la 1-a majo, estis uzata por la kolekto de la necesa nombro de subskriboj kaj nun la granda popolplimulto per 13.088 voĉoj kontraŭ 8.530 sekvis la parolon de l' laboristaj partioj. La parlamento devos do fari pli bonan leĝon, kontentigante la laboristaron.

Sed plej akre sin ĵetis la reakcia bandaĉo kontraŭ la socialista iniciativo por ŝtata loĝejkonstruado. Ĉian rimedon uzis la burĝoj kaj ili ne evitis mensogojn. Laŭ tiu loĝejiniciativo, subskribita de 5.053 voĉdonrajtigitaj enloĝantoj, la kantono Basel-urbo devus konstrui dum 3 jaroj, unuafoje en 1926 j., ĉiujare po ducent loĝejoj da 3 kaj 4 ĉambroj kaj partopreni per subvencioj la jam ekzistantajn loĝejkooperativojn. Tia rimedo estus permesinta solvi la loĝejproblemon en nia urbo laŭ kvanto kaj prezo. Tion tre bone komprenis la domposedantoj kaj la cetera reakciularo kaj oni povas konstati, ke nur malofte la politika batalo atingas tian akrecon. Per malgranda plimulto la burĝoj venkis (11.009 voĉoj kontraŭ 10.614.)

(3477)

Kooperativa movado

Malgraŭ la ekonomia krizo en Germanio, la kooperativa movado iom pliboniĝis en la lasta jaro. Laŭ la raporto 1925-a de la centra unuiĝo de germanaj konsumkooperativoj apartenis al ĝi 1.100 kooperativoj kun 3.382.000 da membroj. Dum la pasinta jaro aliĝis 95.000 personoj.

La spezo plialtiĝis de 381.000.000 markoj ĝis 616.000.000. La en propraj uzinoj fabrikitaj varoj valoris 161.000.000 m., 1924 j. : 90.000.000 m. La investoj (1) sumiĝis je 25 milionoj, 1924 : 12 milionoj. Sekve, ĉi sumo duobliĝis dum unu jaro. La teoria valoro de la grundposedaĵo fine de 1925 j. estis : 89.000.000, 1924 : ĉ. 100.000.000. Kompreneble, la nuna reala valoro estas pli alta. La kreskantan konfidon de la membroj al siaj kooperativoj oni konstatas el la enmetita ŝparmono, kiu atingis la sumon : 69.400.000.

La enmetaĵoj de la membroj, la plej grava kaj certa parto de la propra kooperativa kapitalo estis 20 milionoj, 1914 : 33 1/3 milionoj. Se oni pripensas, ke la enmetaĵoj plene senvaloriĝis dum la inflacio, tiam la rapida reboniĝo estas laŭdinda sukceso. La rezervoj sumiĝis je 29.300.000, 1914 : 24.800.000. Do la tuta propra kapitalo konsistas el 49.000.000 m. La jara profito 1925-a estis 24.200.000 m.

La kooperativoj ricevas la produktojn de la centra aĉetounuiĝo. 58 simplaj aĉetounuiĝoj peras la varojn al la unuopaj konsumsocietoj. Krome ankoraŭ ekzistas centraj provizejoj, kiuj kuŝas en diversaj partoj de la regno. Ci tiuj ankaŭ estas interligataj kun grandaj uzinoj, en kiuj ĉiuj produktoj mem estas fabrikataj. La kooperativoj havas entute 8.500 vendejojn. En ili kaj en la uzinoj estas okupataj 37.318 personoj.

Kompare al privataj vendejoj oni povas aĉeti en la kooperativaj vendejoj je 5 o/o pli malkare. Per tio montriĝas la efiko de la kooperativismo kiel prezregulilo.

Lib. trad. W. Krey (5486).

(1) Ni ne povis diveni kion volas diri la aŭtoro per tiu vorto. Laŭ Kabe, *investi* signifas : solene enkonduki en plenumotan oficon. — *Red.*

La Membrostato
de la Internaciaj Metisekretariejoj

Laŭ la oficiala statistiko de la Internacia Sindikat-Unio statas la membraro de la Internaciaj Metisekretariejoj jene :

Metisekretariejo	Membronombro la 31 dec. 1923.	Membronombro la 31 dec. 1924.
Konstrulaboristoj	1037142	885118
Vestaĵlaboristoj	373415	293084
Ministoj	1941199	1832937
Bindistoj	96064	84231
Tipografistoj	173911	169516
Diamantistoj	19230	20281
Fabriklaboristoj	844988	638357
Frizistoj	8268	8608
Vitrolaboristoj	77741	76111
Lignolaboristoj	711287	630246
Hotel-, Restoraci- kaj Kafej-oficistoj	131480	66806
Ĉapelistoj	56107	56560
Keramikaj laboristoj	91586	83479
Kamplaboristoj	436226	364921
Nutraĵ- kaj ĝuaĵlaboristoj	554199	615355
Ledlaboristoj	340908	349937
Litografistoj	45553	42128
Pentristoj	71704	62095
Metallaboristoj	2585717	1864471
Publikaj servoj	349089	415058
Poŝt-, telegraf- kaj telefonoficistoj	484115	473434
Privatoficistoj	695185	794992
Ŝtonlaboristoj	102264	92548
Tabaklaboristoj	140673	120220
Tekslaboristoj	1326030	985772
Transportlaboristoj	2091840	1921426
	14785921	12947491

La ciferoj, kiuj troviĝas sub 1923 estas prenitaj el la n-ro April-Majo 1925 de «Internacia Sindikat-Movado»; tiuj, kiuj troviĝas sub 1924, el la n-ro April-Majo 1926.

Laŭ la stato je la 31-a de decembro 1924 estas la *Internacia Transportlaborista Federacio* la plej granda metisekretariejo. (Estas laŭdinde, ke ĉi-organizaĵo aplikas esperanton kaj ĉiam amike interilatas kun SAT.) La membronombro ĉiam kreskas. Kvankam la definitivaj ciferoj por la 1-a de januaro 1926 momente ne jam estas indikeblaj, oni do povas konsideri, ke ITF jam nun havas pli ol 2100000 da membroj kaj troviĝas ĉe la pinto de la Internaciaj Metisekretariejoj.

El «Mitteilungsblatt der ITF»,
elgermanigis : 90.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laboron de ĝiaj amikoj estintaj, — estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo : la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla «Fundamento» (1) de la lingvo.

L. L. ZAMENHOF.

(1) La «Fundamento de Esperanto» estas havebla ĉe nia Administrejo.

Du demonstracioj en Berlin

Post la plebiscito pri la elproprigo de l' iamaj germanaj princoj, dum kies preparado la metropolo Berlin vidis ĉiutagajn impresajn mobilizojn kaj demonstraciojn de l' proletaro, podistriktajn kaj centrigitajn, post tiu agitado, kiu postulis multege da streĉoj kaj sinoferoj de la organizitaj masoj, — jam ne laciĝis en Berlin la politika agado. Ne okazis interrompo. Pri du lastdataj demonstracioj mi koncize raportu ; ili ja meritas mencion pro sia speciala karaktero.

Infanpionira trio forvojaĝas.

Unu okazis la 10. julio. Je tiu tago forveturis 3 junaj pioniroj (unu el Virtembergo, unu el Chemnitz kaj unu knabino el Essen) por refreŝiĝo al Sovet-Rusio. Komune kun la rusaj infanoj-pioniroj ili alveturos belan Krimeon, por travivi tie memorindajn horojn. Tiu demonstracio estis nura infan-demonstracio. Nur kelkaj junular-taĉmentoj sekvis la infanaron, kiu kolektiĝis je kelkaj centoj kun siaj belaj standardoj, propra muzikistaro kaj aŭskultis tri infan-parolantojn, kiuj montris elokvente la signifon de la okazo. Poste la infanoj grupiĝinte, bonorde kaj disciplinite kun kantoj akompanis la feliĉan trion ĝis la Silezia stacidomo, de kie okazis la forveturo en vespera horo. Kun manlevo kaj saluto «Estu pretaj !» la restantoj forlasis la veturontojn.

Honorigo al revoluciaj herooj.

La dua demonstracio okazis unu tagon poste, 11. julio, en *Friedrichshain* kaj *Friedrichsfelde.* En Friedrichsfelde estas starigita per la mono de la berlina revolucia proletaro ĉe la tomboj de *Karl Liebknecht, Roza Luksemburg, Franz Mehring* kaj multaj aliaj viktimoj de revolucibatalo, kies nomoj ne tiom brilas, grandioza monumento por la mortintaj herooj de la Revolucio. La monumento efikas nepriskribeble per sia kolosa giganteco, sia simpla, masiva fortegeco. Oni povas nur kompari ĝin kun la aspekto de l' Kremla muro. Sur la murplato estas fiksita granddimensia metala soveta stelo kun insigna martelo kaj falĉilo, kaj skribitaj en ŝtonon estas la vortoj de Freiligrath : «Mi estas — Mi estis — Mi estos». Tiun monumenton inaŭguris, 11. julio, la berlina laboristaro. Senfina amaso kolektiĝis en la urbo kaj laŭiris longan vojon tra laboristaj kvartaloj ĝis la tombejo Friedrichsfelde, la grizaj batalionoj de Ruĝaj Frontbatalantoj, la junularo, la partianoj, la virinoj kaj la infanoj-junpioniroj (akompanataj de sennombraj polic-aŭtomobiloj.) La pretermarŝo daŭris 1 1/2 horojn. Sur la monumento volviĝis ĉielen ruĝaj flagrubandoj ; anoj de Ruĝaj Frontbatalantoj staris ĉe l' tombaro kun pugnigitaj manoj. Du orkestroj ludis marŝritmojn. Sur la tomboj leviĝis florkronoj kun ruĝaj bantoj. Vespera suno orumis la altajn ombrecajn pintojn de la arboj ; seriozeco kaj graveco kuŝis sur la mienoj de l' pretermarŝantoj, kiuj unuiĝis en pensoj pri akraj bataloj, pri la senmortaj viktimoj. — Kaj forta volo je persisto ĝis finfina venko de la laboristaro regis en ĉies koroj... Labkoro (1768).

Berlin, 12. julio 1926.

☆ DISKUTEJO ☆

Pri " Frontunueco "

(*Daŭrigo* *)

Fakoj.

Ĉu ili estas dezirindaj en SAT? Ne necesas longe cerbumadi por alveni al jesa respondo. Estas evidente, ke SAT estus peza, burokrata organismo, se ĝia Centro volus plenumi ĉiujn taskojn. La « Kapo » devas havi kiel taskon nur interrilatigi, interligi la diversajn organojn. Tiel okazas en viva estulo: la koro, la pulmoj, la renoj, la okuloj, k. a. organoj havas ĉiu aparte sian funkcion. Kaj la cerbo estas la reguligilo, la harmoniigilo inter la diversaj organoj.

Simile estu en SAT. Stariĝu multaj fakoj, se bezono kaj fortoj ekzistas por tio. Estiĝu pedagogia, literatura, scienca, ateista, migra, naturamika, sporta, blindula, radia ktp. fakoj.

Sed mi ne laciĝos ripeti: oni ne kontentiĝu per starigo de surpaperaj fakoj. Necesas, ke la K-doj, proponantaj la fondon de fako, estu ankaŭ pretaj preni sur sin ties funkciigadon. Ne utilas proponi, se mankas la fortoj por efektivigi la proponojn.

Oni ja rajtas postuli de la Centro, ke ĝi kuraĝigu la iniciativojn, kiam ili estas saĝaj kaj efektivigeblaj. Sed la Centro ankaŭ rajtas postuli alion ol vortojn por lasi sin konvinkiĝi. Estas tute sensence diri: La gvidantaro faru tion ĉi kaj tion, kiam ĉiu devas scii. ke mankas al ĝi eĉ la tempo por plenumi bone ĉiujn kurantajn aferojn. SAT ne havas 8 salajratajn oficistojn kiel UEA-ICK. Kaj tamen ĝi eldonas du gazetojn, librojn, havas libroservon ktp., unuvorte havas pli da zorgoj ol la neŭtrala Asocio.

Agoj ĉiam parolas pli klare ol vortoj. Laborantoj kaj plenumantoj estu bonvenaj; nuraj proponantoj silentu!...

Jam delonge ekzistas Eldona Fako. Antaŭnelonge ekstariĝis Blindula Fako. Sed la proponintoj ne nur proponis, sed deklaris sin pretaj preni sur sin la respondecon pri la funkciado de la fakoj.

La proponemuloj imitu tiujn ekzemplojn. Ili ne nur desegnu belajn planojn de konstruo, sed ankaŭ pensu ĉu ili havas je sia dispono la necesan materialon por konstrui.

Ne per surpaperaj projektoj ni plibonigos kaj pliampleksigos la SAT-aparaton, sed per modesta, pacienca, metoda kaj senlaca laboro.

Fakoj ja estas dezirindaj en SAT — kaj ĉefe laboremaj kaj spertaj fakuloj...

★

Danĝera iluzio.

Mi ne volas fini tiun ĉi ĝeneralan ekrigardon super nia movado, ne dirante vorton pri iu danĝereto. Estas fervoraj kaj entuziasmaj K-doj, kiuj opinias, ke SAT povas kaj devas fariĝi rapide « amasorganizo ». Jam ili imagas nian Asocion kun 100.000 membroj!...

Ho, ŝatataj revuloj! pardonu se mi tiras vian atenton al la kruda realo. Bonvolu mi petas, observi ĉirkaŭ vi. Ĉu do ne estas videble, ke multaj esperantaj kursoj komenciĝas kun granda nombro (ne ĉiam kaj ĉie) da lernantoj — kaj finiĝas kun malgranda nombro? Mi eĉ scias pri kursoj, kiuj devis ĉesi post la sesa aŭ sepa leciono, tial ke ne plu venis unu sola lernanto! Tamen tiujn kursojn gvidis spertaj, malnovaj esperantistoj. Kaj en la pli malpli sukcesaj kursoj kiom da lernantoj kapablas ĉe la fino paroli flue, legi senpene? Unuvorte, kiom kapablas fariĝi *aktivaj* membroj de SAT?

Mi ja parolas pri « aktivaj membroj ». Se temus varbi ĉiun ajn esperantanon, eble SAT povus fariĝi amasorganizo. Sed ĉiu saĝa kapo tuj ekvidos, ke en tio kuŝas grava danĝero. *Kio ja okazus, se la granda plimulto da SAT-anoj ne kapablus plenumi la taskojn,* kiujn nia Asocio difinis al si? Ne povas esti dubo, ke baldaŭ ĉio disfalus. Mankus ja la solida fundamento.

Se laŭstatute ni akceptas *pasivajn* membrojn, estas nur por ebligi al personoj, kiuj, pro iaj kaŭzoj, ne povas ellerni esperanton, kaj tamen deziras subteni mone nian organizon. Sed estas certe, ke tro granda nombro da pasivaj membroj endanĝerigus nian aferon. Neniam ni forgesu, ke nia movado havas ian vivpravecon, nur se ĝi *praktike, fakte* utilas. Se malrapidas la kresko de SAT, ni konvinkiĝu, ke tion kaŭzas realaj, ne tuje forigeblaj baroj.

Ho ve, la realo ne similas la revon. Esperanto ne estas tiom facile ellernebla, kiel emas pensi kelkaj kleruloj, havantaj grandan facilecon en lernado de lingvoj.

Ankaŭ ni ne devas malatenti, ke ofte la plej lernemaj el la laboristoj estas okupataj per diversaj taskoj en partio, sindikato, kooperativo aŭ en aliaj organizoj. Sekve ni povas en plej bonaj okazoj nur gajni ilian simpation al nia lingvo.

— Rigardu kiel rapide kreskis « Internacia Ruĝa Helpo » kaj aliaj similaj organizoj, flustras al mia orelo iu entuziasmulo.

— Jen ĝusta komparo, ĉu ne vere? Kiuj faras tian komparon, tiuj simple forgesas, ke por fariĝi ano de IRH sufiĉas pagi malaltan kotizon kaj estas ĉio; dum por SAT-aniĝi necesas antaŭe sekvi esperantan kurson dum tuta jaro. Jen kial la du movadoj komparendaj ne estas.

La kredo, ke SAT povas fariĝi amasmovado estas danĝera iluzio. Ĝi riskas naskigi senkuraĝiĝon ĉe entuziasmuloj, kiam ili konstatos ke iliaj esperoj ne plenumiĝis. Aliparte ĝi emigas K-dojn pensi, ke la malrapida kresko de SAT kuŝas en netaŭga organizo de l' propagando. Tial ili elpensas novajn projektojn kun la sincera kredo, ke mirindaj estus la rezultoj se ilia novsistema propagando estus aplikata.

Oni ne kredu, ke mi opinias, ke la propagando por SAT estas farata ĉie kun sufiĉa vigleco. Mi simple avertas, ke ne sufiĉus organizi nacilingvan propagandon, kiel deziras kelkaj K-doj, por ke rapide plimultiĝu la nombro de SAT-anoj *aktivaj*. Tian propagandon entreprenis propriniciative kelkiuj. Nu, la rezulton? Ĝi ne estas konstatebla en la Jarlibro.

Estas vero, ke ne ĉiuj nacilingvaj asocioj propagandas kiel dezirinde por SAT. Sed la taŭga rimedo por forigi tiun mankon, konsistas nur en tio, ke la SAT-anoj devas batali *en* la kadro mem de tiuj asocioj por ke la necesa propagando estu farata. Ili devas batali por ke la por-esperantaj ne faru per-esperantan laboron. Ili celu atingi, ke neniam okazu ia ajn konkurenco inter SAT kaj la nacilingvaj organizoj.

Sed, se SAT rajtas postuli, ke la nacilingvaj asocioj ne faru al ĝi konkurencon, ĉi lastaj havas ankaŭ la rajton, postuli, ke SAT ne faru nacilingvan propagandon.

En plej bonaj cirkonstancoj, nia movado povas nur malrapide kreski, — tial ke ĝi postulas de la membroj ioman gradon da klereco; tial ke ĝi povas altiri nur elementojn ĉe kiuj intermiksiĝas idealismo kaj realismo; tial ke la granda amaso ne sentas ankoraŭ la bezonon transpaŝi la landlimojn, plilarĝigi sian horizonton; tial ke la granda plimulto da homoj estas naciema, ofte senkonscie, dum anticipe ni celas sennaciecan socion.

Ni gardu nin kontraŭ iluzioj kaj kimeroj. Ni ne ŝvebu tro alten en nubojn. Ni nur supergrimpu kelkfoje la altaĵojn por de tie pli bone gvidsigni la vojon irendan. Sed ni ne havu la esperon, ke tuj la amaso forlasos la rutinan marŝon en kiu ĝi vadas.

Ni entreprenis longan vojaĝon. Estus nesaĝe kredi, ke baldaŭ ni atingos la celon. Necesas nur ne senkuraĝiĝi; sufiĉas paŝi senhezite kun la firma certeco, ke ni sekvas la ĝustan vojon.

(Fino.) E. Lanty.

★

Kiu kulpas pri nia neinformiteco?

K-do Levka riproĉe diris, ke mi ne estas sufiĉe bone informita pri la laborista movado en Aŭstrio. Povas esti. Sed, kara K-do, kiu kulpas en tio? Jes, kiu kulpas? Ne miru, se aplombe mi asertas, ke estas vi kaj la ceteraj aŭstriaj K-doj.

Vi ja kulpas treege: Se anstataŭ elspezi tempon kaj monon por la eldono de gazeto, kiu konkurencas al la SAT-organoj kaj al « Der Arbeiter Esperantist », vi estus pli ofte sendintaj artikolojn al Sennaciulo, priparolantajn la staton kaj situacion de la laborista movado en Aŭstrio, eble mi ja estus pli bone informita...

Sed kredeble vi ne lernis esperanton en la celo ĝin aplikadi praktike, sed nur kun la deziro fieri, ke via enlanda organizo prosperas, ke ĝi kapablas eldoni propran gazeton ktp.

Nu, bone, daŭrigu sur tiu malĝusta vojo kaj vi iam spertos, turcerte, ke viaj tempo, energio kaj mono estis elspezataj sen profito por la tutmonda esperanta movado. — Ĉar la mondlingva movado ja havas ian signifon nur se prosperas tutmonda organizo esperantista.

Sed mi ne esperas konvinki vin: La partikularismo, la naciemo estas tro forte vin reganta, por ke vi povu kompreni la sennaciecan vidpunkton.

Mi do restos « ne bone konanta la cirkonstancojn en Aŭstrujo » — kaj vi, bedaŭrinde, ne pli bone konos la kondiĉojn necesajn por ke prosperu alie ol en « via » lando la movado por mondlingvo.

Eŭtrapel.

*) Vidu la n-rojn 93, 94 kaj 95.

Kelkaj antaŭkongresaj pripensoj

Amasa movado ne ĉiam estas potenca movado.

En la jaro 1914 estis fortaj « amasaj » organizoj laboristaj; sed ili ne agis kiel necesis por malhelpi la patriotan buĉadon.

Tio pruvas, ke ni ne devas esti kvazaŭ sugestitaj per la nura penso alceli amasorganizitecon.

★

Se SAT havus *10.000* aktivajn kaj spertajn anojn taŭge distribuitajn en *5.000* urboj el *ĉiuj* mondpartoj, ĝi estus pli forta, pli laborkapabla ol se ĝi havus *100.000* anojn pli malpli pasivajn kaj distribuitajn en *1.000* urboj de nur kelkaj landoj.

La SAT-anoj neniam forgesu tiun kondiĉon pri utiligebleco de nia aparato, kiam ili intencas decidi ion pri la organizado kaj orientado de nia movado.

★

Entuziasmo, fervoro estas same necesaj kiel prudento kaj pripensemo por la prospero de iu ajn movado.

Necesas, tamen, ke la prudento estru la entuziasmon, ke la pripensemo kelkfoje bridu la fervoron.

★

Sama kuracilo povas ne same efiki sur du malsamajn pacientojn.

Simile estas, rilate propagandmetodojn, kiam temas pri malsamkarakteraj organizoj.

E. L.

Al la Socialdemokrata esperantistaro de Aŭstrio !

(*Daŭrigo* *)

Vi povas kredi al mi, sampartianoj, mi estas fidela socialdemokrato; mi estas unu el tiuj, kiuj dum la kongreso en Wien plej forte atakis SAT-on, sed mi devas lojale konfesi, ke la gvidantoj, fakte faris multajn pliboniĝojn kaj multe konsideris la riproĉojn, kiujn oni faris. La K-doj en Paris kaj Leipzig faras ĉion eblan por kontentigi la dezirojn de la membraro. Oni do ne devas nur kritiki, sed kunhelpi al plua plibonigo, kaj de la membroj dependas, fari la gazeton kaj la asocion mem pli kaj pli perfektajn.

Estas nur kulpo de la socialdemokratoj mem, se ne pli da artikoloj de ili verkitaj aperas, se ili tiajn ne ensendas en sufiĉe granda nombro. La Redakcio neniam rifuzis ilin. Do sampartianoj antaŭen, verku artikolojn por SENNACIULO kaj poste montru ilin al influhavaj K-doj en la partio aŭ pli bone ankoraŭ: traduku nacilingvajn artikolojn de tiaj influhavantaj socialdemokratoj esperanten kaj sendu ilin por publikigo. Poste vi montru la aperintajn artikolojn al la koncernaj nacilingvanoj. Vi vidos, ke tiu procedo treege favore impresos ilin kaj certe kunhelpos, forte ŝanĝi aŭ rekte forigi eventualan malbonan, neĝustan ideon pri SAT flanke de tiuj K-doj, kaj ankaŭ kompreneble tio influos forte aliajn kontraŭulojn aŭ skeptikulojn.

Alian ekzemplon: En la lasta numero de SENNACIULO, mi vidis, ke la koresponda rubriko de Sovetio estas multe pli granda ol tiu de Aŭstrio kaj de aliaj landoj. Sed diru vi sampartianoj, tute objektive: Ĉu estas kulpo de la Redakcio de SENNACIULO, se la aŭstrianoj tiom malmulte uzas la korespondrubrikon? Neniu ja malhelpas ilin, ensendi tiom da korespondanoncoj, kiom ili nur volas, eĉ pli ol la rusoj. Se en tia okazo venas iu kaj vidante tion, diras: « SAT estas komunista afero », tio estas simpla distordo de la faktoj.

Vi havas nune propran organon de ALLE, la *Socialisto*'n. Ĉu tio eble estas la kaŭzo de la foresto el SAT, de la nealiĝo, de la preskaŭa bojkoto? — Mi bone komprenas vian deziron, havi en via nuna multnombra organizo propran organon, ĉar antaŭe vi nur aperigis tolerite (?? Red.) viajn sciigojn asociajn en «Arbeiter esperantist». Sed neniel devas esti, ke la SAT-afero per tio suferu. Tio, se vi ĝuste konsideras la aferon, absolute ne povas kaj ne devas esti kaŭzo por nealiĝo al SAT. Mi certe ne estas kontraŭulo de la *Socialisto*, male: mi sincere ĝojas, ke vi kapablas eldoni gazeton, sed se vi per tio suferigas SAT-on, vi tranĉas vin nur en la propran karnon kaj malutiligante la tutmondan esperantistan aferon, vi ankaŭ subfosas vian propran, ĉar unu dependas de la alia. Se do la eldono de la *Socialisto* okazigas al ALLE tiom da kostoj, ke tio malhelpas subteni SAT-on kaj instigi al la aliĝo al ĝi, tiam vi nepre devas trovi ian rimedon por forigi tiun malhelpon. Publikigu simple la asociajn komunikojn de ALLE per hektografe multobligita folio, kiun vi sendos nur al la grupoj, kiuj siaflanke diskonigos la komunikojn al la grupanoj. Tiamaniere vi ŝparos pli ol naŭdek procentojn de la mono, kiun vi elspezas por la multekosta presado de la *Socialisto* kaj tiun laborenergion kaj monon vi povos poste uzi por SAT.

Ni estu tute sinceraj, Gek-doj. Ni estas ja ĉiuj nur simplaj proletoj kaj nia komuna celo estas, kunhelpi harmonie al la kreado de la potenca tutmonda proletaria movado esperanta. Neniu inter ni ja havas personan ambicion kaj vi certe per la *Socialisto* ne volas fari « konkurencon » al SENNACIULO. Tio estus ja nur granda subfosado kaj baro de nia propra afero. Mi diras al vi tute sincere: Kvankam ĝojante pro la fakto, ke niaj K-doj estas tiom talentaj kaj povas eldoni gazeton, se la *Socialisto* en ia rilato baras la *nepre multe pli gravan tutmondan organon* SENNACIULO, *tiam la « Socialisto » prefere tute malaperu* kaj faru lokon al simpla asocia komuniko en la menciita formo.

Do denove: ne lasu vin deteni de la forta, energia subteno de SAT kaj aliĝo al ĝi, per iaj momentaj malfaciloj aŭ skeptika rilato al SAT en partiaj rondoj. Vi povas esti tute certaj, ke via persisto ĉe SAT, kunligita kun la konstanta kresko de ALLE, portos siajn fruktojn kaj sekve de tiu energia persisto oni valorigos vin en la socialdemokrata partio de nia lando kiel *konsiderindan faktoron* kaj se poste iu diros, ke SAT estas « komunista afero », oni simple al li ridos en la vizaĝon, sed tre verŝajne neniu plu tion diros, ĉar vi estos per via energia agado celkonscia eldevigintaj respekton ankaŭ al la plej grandaj skeptikuloj.

Do, karaj Gek-doj, konsideru la vortojn, kiujn nur pro amo al nia komuna afero, sen ia persona intereso aŭ ambicio diras al vi sincera socialdemokrato aŭstria: zorgu por tio, ke la anoj de ALLE grandamase aliĝu al SAT. Se ekzistas personaj diferencoj kun SAT, per amika interkonsento forigu ilin kaj ne suferigu per tio la movadon. Antaŭ la granda afero nia personeco estas nula! Kreu fondon por tio, ke ankaŭ senlaboruloj povu esti membroj de SAT. Pripensu, ke vi nur tiam estos veraj proletariaj esperantistoj, se vi estas anoj de la tutmonda kuniganta asocio.

(Fino.) SINCERULO.

*) Komenco en la n-ro 95.

INTER NI

La ĉeestintoj de l' IV-a SAT-kongreso eble ankoraŭ memoras pri ia strangaĵo, okazinta dum unu el la kunsidoj: la SAT-ano 1999 petis la permeson paroli franclingve por saluti je la nomo de sia instruista organizo.

La kongresestraro konsentis! Tiel nia « SAT-ano » havis la eblecon montri sian... franclingvan kapablon!...

Neniam mi povos forgesi la strangan senton, kiu tiam min atakis: naŭzo, ridemo kolero, mokemo, indigno intermiksiĝe min incitis.

Du jaroj baldaŭ estos forpasintaj de tiu memorinda okazintaĵo, kaj jen denove mi spertis la saman senton, legante en la n-ro 93 de « S-ulo » iun longegan artikolon « speciale » verkitan franclingve de tiu sama K-do. Li estas ja « speciala » SAT-ano; li kompleżas verki por nia gazeto, sed nur franclingve, kaj alia K-do devas esperantigi lian verkaĵon.

Antaŭ du jaroj, oni povis pensi, ke tiu « SAT-ano » estus pli saĝa, se li silentus. Sed oni ankaŭ povis indulgi la novan varbiton kun la espero, ke post la kongreso li diligente lernos la lingvon kaj fariĝos inda sennaciulo.

Vana espero! Nia franclingvano pagis ja tre akurate la kotizon, enviciĝis inter la « aktivajn » anojn, sed ne lernis la lingvon...

Ne kun la malica intenco hontigi K-don Bracops mi pribabilas tiun fakton, sed por elstarigi unu el la kaŭzoj, kiuj malhelpas la rapidan malvolviĝon de nia movado.

Kiam oni ja konstatas, ke klera homo, post du jaroj de SAT-aneco, ne kapablas uzi nian lingvon, oni do ne miru, se mult-

aj lernantoj forlasas la kursojn post kelkaj lecionoj.

Kaj oni gratulu varmege la simplajn laboristojn, kiuj diligeute kaj persiste, post laciga laboro, lernakiras sufiĉan esperantoscion por paroli kaj skribi en nia lingvo.

Oni grave erarus, opiniante, ke tiu Brusela « SAT-ano » estas escepto. Ni bedaŭrinde povas konstati similajn faktojn en preskaŭ ĉiuj urboj.

Ni ne sukcesis sufiĉe penetrigi en la cerbon de niaj alpropaganditoj la fortan konvinkon, ke la unua nepra devo de ĉiu internaciisto estas ellernadi la internacian lingvon.

Kiuj forte konsciis pri tio, tiuj ne nur ellernis sed ĉiutage uzadas *esperanton. Ili unue estis konsekvencaj internaciistoj kaj nun fariĝas pli kaj pli konsciaj sennaciuloj.*

IUELIE.

ELDONA FAKO DE SAT

Post kelkaj tagoj estos finpresita:

ETIKO

de P. KROPOTKIN

240 pĝ. Prezo: 2 mk. g. inkluzive afranko.

Tre baldaŭ aperos:

KARL MARX lia vivo kaj lia verko

de V. ELSUDO

Nun estas kompostata kaj aperos post kelkaj semajnoj:

Ŝtato kaj Revolucio

de LENIN

Ĵus estis liverata al presisto la manuskripto de

Je la nomo de l' Vivo

originala verko de E. IZGUR.

La volumo estos 226-paĝa, la teksto riĉe ilustrata kaj la presado luksa.

Baldaŭ aperos la II-a eldono de

Nur volu!

Estas nun preparata la II-a 20.000-ekzemplera eldono de

PETRO

(Interesos ankaŭ la legantojn ekscii, ke nun estas preparata en Leningrad la brajla eldono de tiu verko.)

★

Manuskriptoj abundas, nur mankas aĉetantoj de akcioj de nia Eldon-Kooperativo. — Tiuj akcioj valoras 1 amerikan dolaron kaj liveras al la posedanto renton je 10 %. Duondolaraj akcioj estas ankaŭ aĉeteblaj. Pliajn detalojn oni petu de la SAT-Administracio.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj

Esperanto allasata por internacia telegrafado.

Popolkomisario de Poŝto kaj Telegrafo de Sovet-Unio decidis pri permeso uzi esp-on en internacia telegrafado kaj diskonigis cirkulere la suban tekston :

« Pri allaso de Esperanto en internacia telegrafado

La 17-an de junio 1926. N-o 6/304

En internacia radiotelegrafa kaj telegrafa trafiko inter USSR kaj Albanio, Aŭstrio, Belgio, Dancigo, Hispanio, Estonio, Francio, Italio, Litovio, Luksemburgo, Norvegio, Polio, Jugoslavio, Saar-teritorio, Ĉekoslovakio kaj Turkio estas allasata la uzado de esp-o.

La permeso validas nur por la depeŝoj, verkitaj en ordinara lingvaĵo. Apliko de esp-o en *kondiĉa* lingvaĵo ne estas permesata.

Informu la telegrafantojn per speciala anonco sur videbla loko, klariginte en piednoto, ke ordinara lingvajo nomiĝas tia, kiam la frazoj havas klaran sencon en tiu lingvo, sen neceso por la scipovanto de tiu lingvo uzi iujn specialajn ŝlosilojn aŭ vortarojn. »

★

Rezolucio de Sovetia Radio-Amatora Kongreso por Esperanto.

Siatempe en SENNACIULO jam estis publikata informo pri decidoj de la I-a Tutsovetia Kongreso de la Societo de Radio-Amikoj rilate esp-on. Nun ni havas la eblon publikigi la plenan tekston de la rezolucio tiurilata.

« *Pri Internacia Lingvo*

Tutsovetia Kongreso de la Societo de Radio-Amikoj. aŭskultinte la raporton de K-do Kazakeviĉ pri esp-o, rekonas necesa la aliĝon al la decido de la Internacia Kongreso de Radio-Amatoroj pri aplikado de esp-o por brodkastadoj kaj ankaŭ por skribaj interrilatoj inter radio amatoroj kaj iliaj organizoj.

La Kongreso agnoskas, ke la lingvo esperanto, tial ke ĝi estas la plej atingebla por la vastaj amasoj de laboruloj tutmondaj, efektive povas kaj devas esti rimedo de ilia interligo.

La Kongreso rekomendas al ĉiuj membroj kaj al la lokaj organizoj de la Societo de Radio-Amikoj lerni kaj apliki esp-on kaj aniĝi al SEU kaj SAT. La Kongreso proponas al la nove elektita Konsilantaro :

1) prizorgi senprokrastan organizon de ciklo da radiolekcioj kaj lecionoj de esp-o per la ĉefaj brodkastaj stacioj, tiamaniere ke post fino de unu ciklo de la lekcioj komenciĝu la alia ktp.

2) en la presorgano de la Societo estu dediĉita speciala fako por informado pri esp-o kaj instruado ĝia.

3) interrilati kun la internacia Centro pri radio kaj pri malfermo de esp-o fakoj en nacilingvaj eldonaĵoj. »

★

Grava pedagogia revuo utiligas esperanton.

" La Vojo de Klerigo " (ukrainlingve " Ŝlaĥ Osviti ", ruslingve " Putj Prosveŝĉenija ") aperas po dika (pli ol 200 pĝ.) volumo ĉiumonate depost majo 1922. Publikigata de la Popola Komisario por Klerigo de l'Ukr. Soc. Sov. Resp., ĝi celas kolekti la spertojn akiratajn dum la grandega rekonstruo de l' edukada sistemo, kiu estas farata depost la Revolucio. Sumigante kaj ĝeneraligante la rezultojn de ĉiuj en- kaj ekster-landaj pedagogiaj serĉadoj, la revuo ankaŭ markas la vojon por plua organiza kaj metodologia laboro en la sfero de edukado en Sovet-Ukrainio.

La Redakcio de " La Vojo de Klerigo " opinias taŭga helpi al la komencita interproksimiĝo kaj kultura kooperado de Okcidento kun Sovetio per internacia diskonigo de la eduk-agado de Sovet-Ukrainio. Unu el la paŝoj ĉi-direkten estas la nun komencata publikigo de *esperant-lingva* resum-folio prezentanta al la tutmonda edukistaro la enhavon de nia plej grava pedagogia revuo.

★

La resum-folioj de " La Vojo de Klerigo " estos publikigataj laŭeble regule ĉiumonate kaj estos senpage dissendataj al ĉiuj interesatoj (oni komuniku la adresojn al la redaktejo : Spartakovski per., 3 — Ĥarkov — Ukrainio — USSR).

Ĉiuj kolegoj ricevantaj la resum-foliojn de La Vojo de Klerigo estas petataj traduki ilin nacilingven kaj diskonigi ilian enhavon per la edukistaj organizoj. Pri la rezultoj oni bonvolu informi la Redakcion de " La Vojo de Klerigo ".

Samtempe ĉiuj kompetentai avangardaj edukistoj estas invitataj kunlabori por " La Vojo de Klerigo " per artikoloj kaj korespondaĵoj (oni komuniku al la redaktejo la temojn propanatajn). Por la akceptitaj artikoloj estas pagata honorario.

★

Okaze de la oka Intern. Lab. Konferenco en Ĝenevo, oni decidis, pro sperto dum kunsido de malfacilaĵo pro uzado de tri lingvoj, ke la lingva problemo grave malhelpas plenan inter-kompren-kaj-agadon de la dirverslandaj laboristoj ; tial oni konsilis al la naci-internaciaj lab. organizoj kaj individuaj membroj, uzi esp-on kiel help-lingvon.

★

Britio.

Londono. — La Brita Ligo de Esp-istaj Soc. havis sian distriktan renkontiĝon dimanĉon 18. jul. Krom individuaj membroj estis reprezentataj la grupoj " West Ham ", " Canning Town ", k. Lab. Esp-o - Klubo. Matene paroladis K-do I. Floro k. postagmeze K-dino T. Yelland. Vespere okazis ĝenerala diskutado pri estonta laboro de la Ligo.

Laborista Klubo kunvenas ĉiun sabaton de 18-30 ĝis 23-a ĉe 144, High Holborn, London W.C.1. Aranĝoj por SAT-kongreso donis al nia klaso kelke da lernantoj. 30 Gek-doj aliĝis la Kongreson. Bedaŭrinde tro malfrue ni estis informataj pri la rabato por ŝipveturo k. jam faris specialajn aranĝojn. — El malproksima Astraĥano alvenis monhelpo de SAT-anoj por la karbministoj. — Leteroj de K-dinoj alilandaj aperas en " Labour Woman ". Granda nombro da kantoj el SAT kantaro estas multobligita k. ofte k. entuziasme kantata ĉe ĉiu kunveno. 17/7/26 du K-doj el Hungario vizitis nin. Klubo daŭras ekzisti per monkolektoj nur. — *164.*

Ĉeĥoslovakio.

Gablonz a.-N. — Dimanĉe 11. jul. ni kunvenis kun la orientsaksianoj en Innecenendorf, apud la landlimo. Du ŝarĝaŭtomobiloj portis 47 lab. esp-istojn el la Isermontaro (Ĉehoslov). Entute kunvenis 73. La Dresdenanoj pro manko de mono bedaŭrinde forestis. La programo enhavis tre interesajn punktojn : komencante per la entuziasmiga poemo " Ignis Sanat ", ni daŭrigis per komuna kantado de : " Al la Sennaciularo ". Tre menciinda estas la teatraĵo " La varmega fero " de Hans Sachs, bonege prezentita de K-do Scherbaum kaj du K-inoj.

La 14 raportoj de K-doj el diversaj lokoj montris, ke dum la lasta tempo la anaro pligrandiĝis. Per la interŝanĝo de sperto ni lernis. — *Satanino 4666.*

Germanio.

Berlin. — SAT-anoj ĉi-tieaj kunvenis dufoje k. diskutadis la temon pri SAT k. la nacilingvaj organizoj. La konkludo de tiuj diskutoj estis jena:

« 1) Unueco de por k. peresperanta laboroj en *unu* organizaĵo tutmonda; 2) La organiza formo k. statuto ebligu la kunflon de LEA-j ĉiulandaj kun SAT k. kunigon de ĉiuj progresemaj esp-istoj proletaj; 3) Anstataŭo de la nuna netaŭga sektora sistemo per praktika sektordivido laŭ lingvoregionoj. » — *Vildebrand, 483.*

Leipzig. — Nia k. najbaraj grupoj aranĝis, 11. jul., komunan ekskurson. Ĉeestis 45 Gekdoj el Oschatz, Eilenburg, Chemnitz, Dresden, Riesa, Wurzen, Leipzig. En kunsido oni priparolis propagandon k. s. Lasttempe estis malfermata kurso por kursgvidantoj. Kursgvidadon afable transprenis K-do Kaiser el Altenburg. — *W. Krey, 5486.*

Solingen. — Kaŭze de la ekonomia mizero nia grupo malgrandiĝis iomete; sed la fidelaj restintoj nun forte klopodas por revigligi la movadon. K-do 5207 nun instruas en senkonfesiaj lernejoj esp-on al pli ol 100 infanoj. Ankaŭ la instruistaro de tiuj lernejoj ekinteresiĝas pri esp-o. — La kom. gazeto bonakceptis informojn pri la angla ĝen. striko, kiujn ni ricevis pere de la SAT-aparato. Bedaŭrinde ne ĉiam la red. sciigis la legantojn, ke la informoj estas tradukitaj el esp-o. — Demonstraciojn ni partoprenas kun nia standardo k. nun en nia urbo ĉiu kredeble scias pri esp-o. — La 3. k. 4. julio okazis " ruĝa tago " de la frontbatalintoj. Esp. K-doj el Dortmund, Herne, Recklinghausen, Wald k. Solingen kolektiĝis malantaŭ nia standardo; entute ni estis pli ol 100. Okaze de tiu demonstracio ni ricevis de K-doj el Aalsmeev k. Amsterdam salutleterojn, kiujn publikigis nia kom. gazeto. — *3992.*

Norvegio.

Oslo. — 30. majo finiĝis daŭriga kurso per ekzameno. 7 K-doj sukcesis ricevi ateston pri kapableco. La osloa grupo okazigis 3 bonevizititajn ekskursojn dum kiuj ni ekzerciĝis parolante k. kantante esp-on. Finnlanda K-ino jus vizitis unu el niaj esperplenaj novadeptoj. Espereble iu el la partoprenontoj de nia VI-a vizitos nian urbon. Niaj membroj sopiras renkonti eksterlandan samlingvanon.— *102.*

Polio.

Varsovio. — La 4. julio okazis ĉi-tie la 3-a tutlanda konferenco de la societo " Laboro ", kiu, inter aliaj statutŝanĝoj, alprenis la titolon : " Lab. Esp. Soc. de Polio ". Estis reprezentataj jenaj urboj : Varsovio, Lodz, Lublin, Lwow k. Wilno. Estis decidite : a) kunligi pli firme la por-esp-an propagandon tra la tuta lando; b) eldoni lernolibron por laboristoj k. gvidfolion por memlernantoj; c) publikigi alvokon al la polia laboristaro. — Prezidas la societon K-do Hartmann, sekretarias K-do Koss. Al ĉi lasta oni adresu ĉiujn sendaĵojn. Adreso : *Warszawa* Leszna 28. m. i 3.

Sovetio.

Kremenĉug. — Kiel kolektiv-ano al SAT aliĝis la fervojista klubo " Kotlov " el la apudurbo *Krinkov ap. Dnepro.* La klubo komisias por la VI-a SAT-kongreso propran delegiton. — La Loka SAT-" Labesko " funkcias (kun la partopreno de K-doj Goldfeder, Ŝapirovski, V. K., Frejdberg); ĝi priservas la lokan gazeton " Naŝ Putj ", ankaŭ la ĥarkovajn " Proletarij " kaj " Komunist ". En tiuj gazetoj aperis korespondaĵoj, ricevitaj per esp-o el Germanio, Britio, Nederlando, Aŭstrio, Japanio. — *Dneprano.*

Minsk. — En Blankrusio viglas mia movado. K-do A. Whitham, teksisto el Burnley (Anglio) k. K-ino A. Bouda, el Ĉeĥosl., vizitis nin k. en ĉiuj kluboj, institucioj, k. c., ĉiam uzis esp-on. Bonefikis. — En multaj gazetoj aperis leteroj de eksterlandaj esp. korespondantoj. Krom tio nia oficejo aperigis artikolojn en germ., franc., holl., portug., angl., ital. k. afrikaj gazetoj. Per nia oficejo " Komjunularo ", Centra Minska Partia Klubo k. aliaj organizoj interligiĝis kun samaj org. en eksterlando. — Ekspozicio estis organizita en nia urbo. — 450 ruĝarmeanoj entuziasme lernas esp.-on. — En kelkaj lernejoj oni ankaŭ lernas nian lingvon. En lab. fakultato ĉe *Blankrusa Regna Universitato,* esp-o estas oficiale akceptata t. e. same konsiderata kiel naciaj lingvoj. — En Blankrusio estas nun pli ol 120 SAT-anoj. Nia agentejo disvendis 1610 lernlibrojn (el kiuj 420 " Petro "), 580 vortarojn, 758 esperantajn librojn, 160 insignojn, ktp. Ankaŭ menciinde estas, ke nia agentejo akceptis 156 kvaronjarajn abonojn al " S-ulo " k. 49 jarajn al " S. R. " Aliaj gazetoj ankaŭ estas abonitaj. — El raporto de K-do *Dim. Snejko.*

Stalingrad. — Nuntempe ni havas 14 grupojn por ellernado de esp-o kun ĉirkaŭ 400 lern. En lernejoj, kluboj, rondoj ni vigle propagandas. La instruistaro ĝenerale favoras nian movadon. Nur unu pedagogo, profesoro de franca lingvo, akre kontraŭbatalas esp-on. Li timas kredeble perdi sian oficon. Ni korespondadas kun multaj landoj. Ni esperas baldaŭ plimultigi la nombron de SAT-anoj en nia urbo. — *5907.*

Svisio.

Bern. — « La VIII-a Kong. de *Svisa Fervoj-Asocio,* okazinta 3. k. 4. julio 1926, subtenas la klopodojn por int. helplingvo. Ĝi rekomendas al la membraro la lernadon de esp-o, kiun hodiaŭ ludas elstaran rolon... » Tiu rezolucio estis alprenata *unuvoĉe.*

Zurich. — Ĉe lab. infangrupo funkcias kurso kun 8 lern., gvidata de K-do 1446. La intereson por esp-o vekis poŝkarto sendita el Sovetio. Kiuj deziras interrilatiĝi kun la grupo skribu al la kursgvidanto. (Legu adreson en Jarlibro). — *1446.*

Ĉe la neŭtraluloj

La 18-a Universala Kongreso de Esperanto kaj Internacia Somera Universitato okazos en Edinburgo de la 31. julio ĝis 7. aŭgusto.

★

Al la ĉi supre menciata kongreso grava laborista organizo sendos reprezentanton.

En la bulteno de *Internacia Transporta Federacio* (jun. 1926) oni ja povas legi jenon :

« La Direkta Komitato de I. T. F. decidis, responde ricevitan inviton, sendi reprezentanton al la internacia kongreso esperantista, okazonta en Edinburgo. La prezidanto de I.T.F., C. T. Cramp, ricevis mandaton por reprezenti nian organizon ĉe tiu kongreso. »

Sendube Leningrad estas tro malproksima por ke I.T.F. sendu reprezentanton al la lab. esp. Kongreso, de kiu tamen ĝi ankaŭ ricevis inviton...

★

La 13-a bulgara Esperanto-Kongreso okazos en Varna de la 15. ĝis 18. de aŭgusto.

★

La katolikaj esperantistoj internacie kongresos en Spa (Belgio) de la 14. ĝis 17. aŭgusto.

★

Tutaŭstria Esperanta Laborkonferenco okazos la 1. aŭgusto en Wien.

La polica direkcio ordonis, ke en la ĉefaj stratoj de la urbo k. en la stacidomoj deĵoru daŭre policanoj kapablaj paroli vivantajn lingvojn k. ankaŭ esp-on. (*El " Heroldo "*).

★

La ministro de P. T. T. de Ĉeĥoslovakio ordonis, ke, post 15. aprilo, esp-o por telegramoj estu konsiderata lingvo klara. Sama regulo estos aplikata ekde 1. nov. 1926 en Germanio. En Rumanio ĉi-regulo datas de 1909. Samcela estas decido ĉe lasta konferenco internacia de l' Universala Telegrafa Unio de 1925.

★

Pere de eksministro sudslava, S-ro Radić, la komerca fakultato de Zagreb'a Universitato decidis konduki esp-on en instruan programon, po ses horoj ĉiun semajnon.

NEKROLOGOJ

La morto forrabis nian tre laboreman K-don **Konrad Lück**, 26-jara (SAT-ano 2749)

Honoron al lia memoro!

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA.

★

Turmentita de la proleta malsano « ftizo » mortis la malnova SAT-ano (1364) K-do **Luka Ŝipek,** Igriŝĉe (Jugoslavio).

Honoron al lia memoro!

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA.

PRIKONGRESAJ INFORMETOJ

Ekskurso en N-Novgorodon post la VI-a SAT-Kongreso.

Dua informa letero.

Al nia unua komuniko (SENNACIULO n-ro 84) ni devas aldoni la jenon : Se efektiviĝos la projektata ekskurso de la kongresanoj en Moskvon, ŝanĝiĝos konsekvence ankaŭ la vojiro de la karavano al N-N. La kongresanoj partoprenantaj la ekskurson forveturos el Moskvo al N-Novgorodo *fervoje* (ununokta veturado). La gastado en N-N. daŭros 3 tagojn kaj la revojaĝo ĝis Leningrad proksimume 1 tagon. Prez. de fervojveturado proksimume (sen rabato) de Leningr. ĝis M. 16 gm. kaj de M. ĝis N-N. sama sumo. Rekta vojaĝo el Leningr. ĝis N-N kun rajto halti en M. por 1-2 tagoj kostos pli malkare (ĉirkaŭ 25 gm.) Loĝejo en N-N senpaga, prezo de manĝado 2 gm. potage. Ni esperas multnombran alvenon! Adresu ĉion al K-do Konovalov.

ORGANIZA KOMISIONO.

★

Blankrusia delegitaro por partopreno al SEU kaj SAT-kongresoj forveturos el Minsk la 31 julio. Mi petas la K-dojn, kiuj enveturos Sovetion tra Polio, ke ili alvenu Minskon antaŭ la 31-a. Ilin ni renkontos ĉe la limo.

La K-doj kiuj veturos al Minsko post la 31-a, nepre komuniku la precizan daton de sia alveno, por ke ĉitieaj SAT-oj povu renkonti ilin. — Ĝis la 31 julio oni skribu al K-do D. Suejko, post tiu dato, al K-do Maksimov, (Adresojn vidu en la Jarlibro).

Postkongresa Blankrusia karavano estos organizata en Leningrad. Interesatoj tuj informu nin. — *(603).*

★

STA-ana rondo en Vitebsk organizos renkonton kun K-doj, veturantaj tra ilia urbo. SAT-ano deĵoros kun standardo ĉe la stacidoma perono. — K. LAPENKO.

★

La jenaj SAT-anoj deklaras, ke ili subtenas la proponojn de la Bruselaj K-doj, publikigitajn en la n-ro 95 de SENNACIULO : 1784, — 1854, — 1924,— 2821, — 646, — 6402, — 5896. (Ĉiuj el Verviers, Belgio.)

Le Gérant : L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. SOLSONA, 9, Rue Hallé, Paris-14ᵉ — Telefono : Gobelins 62-71